





*Scienca Revuo Vol.44 (1993)(2)-163*

*RECENZO*

*Carl Benedek:*
*"Das Iberische Erbe Spaniens : die rätselhafte Geschichte eines Volkes"*
*Casimir Katz Verlag, Gernsbach (D), 1990*
*ISBN 3-925825-49-5 (551 p., 44.-DEM)*

*"LA IBERA HEREDAĴO DE HISPANIO :*
*LA ENIGMA HISTORIO DE POPOLO"*

La autoro naskiĝis en 1889 en Budapest, estis profesia ĵurnalisto de gvidaj europaj ĵurnaloj ĝis fino de la tridekaj jaroj k vivis multajn jarojn en Hispanio (li mortis en 1964). Li konis persone Lenin, Mussolini, Hitler – tamen li serĉas pruvi la hipotezon, ke la historio de popolo estas destinato ne per karakteraj regantoj, sed per la kolektiva psiko de ĝia amasoj. La heroo de la amasoj "*no es otra cosa que el alma colectiva individualizada*" (Unamuno) – do estas ties individua revelacio.

Lia ideo baziĝas sur teorio de C. G. Jung aplikanta psikoanalizon al popola amaso je la ekzemplo de la plej historia k plej homogena etnoj de Europa, la hispana, ĉar la keltiberoj estas la solaj, kiuj de komenco de la historio restis sur siaj praterenoj k ne miksiĝis tro kun aliaj gentoj.

Li priskribas la mentalan parencecon de la hispanoj kun la nordafrikaj gentoj k emfazas, ke la ĝermanta asocia ordo de la Iberoj detruiĝis per invadanta roma impeto, kiu altrudis al ili indogermanan kulturon. La iberaj gentoj povis travivi la ruinigajn romajn perfortojn, sed retrovis ne plu gentan memkomprenecon al popola restarigo sed estiĝis, post fino de la roma okupado, senhelpaj viktimoj de novaj invadantoj (visigotoj, araboj).

Ili ankau ne asimiliĝis al la importataj civilizaĵoj, antau ĉio ne al roma ideo de iu ŝtata ordo; lau Benedek ili retiriĝis post la kolapso de la hereditaj etnaj atingaĵoj sekve de roma ekspluatado al aroga k pasiva negativismo, kiu rolis kompensado por la hispana popolanimo pro popola malplivaloreca

komplekso.

La ekzistado de ĝuste tia popolanimo estas la temo, priskribita per multaj ekzemploj el la hispana historio.

La ibera praamaso reprezentas la kolektivan mion de la popolo, kiu estas sendependa de la konscio. Romo batalis kontrau la neorganizitajn ribelojn de tiuj iberaj gentoj pli longe k pli kruele, k la kontraŭstata partikularismo de la gentoj "vivigas k mortigas" la hispanan historion per rapsodia sinsekvo de ribeloj, kiuj plilongiĝas en la hispana Ameriko kiel senfinaj ŝtatrenversoj de ekspluatantaj klikoj.

Estas ja konata sinteno ankau de religia hipokriteco, ion ŝajne fari por la mizeruloj k ne agi kontrau la kauzoj de la malriĉeco. Kiu interesiĝas pri skizo de la pasintaj cent jaroj de la hispana historio legu la paroladon de Generalissimo Franco antau la Cortes je la 14a de majo 1946.

La identeco de la historia kastila Hispanio estas stampita per la militistaj kavaliroj kun iliaj kristana maltoleremo, per la sensualeco de la arabaj metiistoj k per la sukceso de la judaj komercistoj k ties intelekta arogo, kiujn ambau la kastilanoj neestimis.

En Hispanio mem la malamo kontrau la ĉantaĝanta ŝtato de la klikoj ŝanĝiĝis en antisemitismon, kiam la judoj sekve de iliaj ennaskita ŝtatlojaleco estiĝis ne nur riĉaj sed povaj, k tio okazis lau direktado flanke de la katolikismo.

Anstatau racia agado, en la ibera kredema fatalismo kontraubataliĝas sennombraj gesanktuloj, sed lau la afrika, luno–adoranta deveno superas du ĉefaj: la patrino de dio k la *madre anarquía*; sekve, ĉiuj iliaj herooj estas prototipoj de iu ribelo.

La antipatio kontrau ĉiu logika diskuto k iu masoĥista–sadista komplekso trapenetras la hispanan kristanismon dekomence. "*El beltanchaún*" (proksimume mondkoncepto) estas fremdvorto; gravas neniam la objekto, ĉiam nur la kred<u>ado</u> kiel pasio. La katolika teroro de la *nueva inquisición* murdis per brulŝtiparo en la jarcento de la Grand–"inkvizitoro" Torquemada ene 25 jaroj 348909 homojn, ne pro la celo sed pro la "ĝusta" vojo. Sed la maltoleremo komencis jam en 385 kontrau la anoj de Priscillianus.



Tipe pri Hispanio estas ne nur la tirana arbitreco de la inkvizicio, sed ankau ties netolerebla dauro, ĉar Iberoj estas nepacigemaj; ĉu kiel Romanoj, katolikoj, konkerantoj, republikanoj au falanĥistoj, ili batalas ne pro komercaĵoj, sed por gajni povon per kredo al iu iniciatinta genta gerilisto (*caciquismo*), k eĉ en ĉiuj partioj: hispanoj batalas ĉiam en intercivitanaj militoj. La autentika mondo estas tiu de la persona gerilo. La autoro priskribas tiajn ekzemplojn de la subversivaj destruktivaj fortoj de la ibera kolektivpsiko k eksplikas ilin per la perforta sufokado de la ankorau ne evoluita popola konscio flanke de la romaj konkerantoj; el tio rezultas Hispanio kiel "fragmenta nacio" (Joaquín Costa).

Ni ekscias el la libro ankau la motivojn al kelkaj historiaj eventoj ekz. pri la t.n. akvo–kortumo en Valencia el la tempo de Abderrahman III (el 960) lau roma araba juro k la fakto, ke la urbo Valencia spite al fanatika katolikismo enkondukis la kalkuladon lau kristana erao nur en 1358, pro tipa ibera obstino.

Lau la ibera talento la hispanoj ŝatas ĉiun okupiĝon, al kiu ili libervole sindevigas: ili estas majstroj de koloro k formo, de la arto k de la lingvo, k la ekscitanta dancado de la *puellae gaditanae* estis jam famekonata je la tempo de Martialis k Juvenalis.

Ĉar tauroj k ĉevaloj estas sanktaj bestoj de la Iberoj, tio esprimiĝas ankau en la torero–kulto, tiu "duelo" de homa lerteco k besta sovaĝeco, persona ludado kun la morto. Hodiau la Iberoj defendas ĝin kun la sama obstineco, kiel la popolo protestas kontrau la, kelkfoje ofice proponita, fino de la herezulo–persekutado k judo–diskriminacio. Ĉu la *tauromaquia* estas la plilongigita ludado kun la morto inter sanktuloj k ekzekutistoj, pravigita per la lukto kiel pracelo de la profiligo ? La fatalisma mortemo kulminas tragike en la ekkrio: "*viva la muerte*" !

Al esperantistoj specife adekvata devas esti la utopisma karaktero de la romanfiguro *Don Quixote de la Mancha* ! La "kavaliro de la trista staturo" k sia kompaniano *Sancha Pansa* vole–nevole reprezentas kvazau "fundis" k "realos" (verdaj fundamentalistoj k realistoj) !

La aventuro kiel hazardludo estas la celo de la hispana *caballero*. Ĉiu fabel-heroo simbolas kolektivaniman arketipon de la amasoj : la nekonscia idealo de la justa bandito, kiuj estiĝis senmortaj en la hispanaj elformoj.

Kaj se temas pri herooj certe ne devas manki tiu, de arde-okulaj monaĥinoj adorata tipa hispana *macho Don Juan*; la admiro de ĉiuj geamantoj de la "ge-*tauromaquia*do" estos ĉiam al li certega !

Ili ambau estas aventuristoj, staras en kontrasto al civitana ordo, estas anarkiaj k senbridaj karakteroj, malŝpare fordiboĝas, malestimas la laboron, ne strebas al trezoroj, sed aspiras la vivon de *Gran*-sinjoroj, estas sendependaj k egocentraj, estas – herooj. Ili ambau reprezentas la eternan iberan idealon k ekscitas la fantazion de la hispana amaso per la neresistebla povo de nekonscia memoro.

Ni admiras la hispanojn, kiuj kuraĝas reprezenti siajn senmortajn idealfigurojn per profunda memironio kaj kiel strangan karikaturon kaj kiel malmoralan konkeriston ! K ni dankas al tiuj autoroj, kiuj sukcesis superruzi la teroristan literaturinkvizicion.

Mi ne volas fini kun citaĵo de Seneca, tiu hispana filozofo kun andaluza profilo: *plus scire velle quam satis intemperantius genus est* – ĉiu, kiu volas scii pli ol necesas estas senbrida, sed kun la eufemisma citaĵo de nobelpremiita Jacinto Benavente: "*ya sabemos, que en España no existen problemas*" – ni do scias, ke en Hispanio ne ekzistas problemoj !

rh





*RECENZO*

*Camille Paglia:*
*"Die Masken der Sexualität"*
*Byblos Verlag, Berlin (D), 1992*
*ISBN 3-929029-06-5 (855 p., 58.-DEM)*

*"Sexual Personae. Art and Decadence*
*from Nefertiti to Emily Dickinson"*
*Yale University Press, London and New Haven, 1990*

## "LA MASKADOJ DE LA SEKSECO"

"En la komenco estis (ne iu logos, sed) naturo. Antau ĝia fono k kontrau ĝi estis formigitaj niaj dio-ideoj; pro tio naturo restas lim-nocio en ĉiuj demandoj pri moralo k moraleco" ... "Asocio estas formitaĵo, farita per homoj, fortikaĵo kontrau la povo de la naturo. Sen asocio, sistemo de hereditaj formoj, ni estus ŝiprompuloj elmetitaj al la naturo. ... Sed nenia asocia ŝanĝiĝo ŝanĝos la naturon. Homoj estas nur unu inter multaj vivaĵoj, sur kiuj la naturo sendiference influs sian povon".

Tiel tekstas la komenco de la multpaĝa libro.

Camille Paglia revizias la okcidentan kulturnocion kiel historion de seksaj maskadoj k senmaskigoj. La, de viroj konceptita, kultur-historio senvualiĝas kiel milito kontrau senbrida sekseco celante ties subpremon. Ankau la "feminismo" estas nur stulteta provo, en la senfina konflikto inter Dioniso k Apollono domestigi la seksecon.

Sekseco estas la kontakto inter homo k naturo, ĉiutempe demona, el asocia vidpunkto subversiva (Angela Carter). La humanismaj iluzioj de la maskado estas disŝiritaj – ne nur en la arto, sed en ĉiutagaj erupcioj de perforto.